Heinrich Heine,

# Wasserfahrt

Ich stand gelehnet an den Mast,
Und zählte jede Welle.
Ade! mein schönes Vaterland!
Mein Schiff, das segelt schnelle.

Ich kam schön Liebchens Haus vorbei,
Die Fensterscheiben blinken;
Ich guck mir fast die Augen aus,
Doch will mir niemand winken.

Ihr Tränen, bleibt mir aus dem Aug,
Daß ich nicht dunkel sehe.
Mein krankes Herze, brich mir nicht
Vor allzu großem Wehe.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17).*

*Arg-208-415 (2004-03-13 22:48:43)*

*Das Gedicht befindet sich in Heinrich Heines Werk „Buch der Lieder“, im Abschnitt „Junge Leiden – Romanzen“, Nr. XIV.*

Heinrich Heine,

# Akvoveturo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ĉe l' masto min apogis mi
kaj nombris ĉiun ondon.
"Adiaŭ nun, patrujo vi![2]
Mi volas en la mondon."

Ekbrilis la fenestroj de
la karulina domo,
rigardis streĉe mi, sed ne
mansvingis iu homo.

Vi larmoj, reteniĝu vi,
por ke mi ne blindiĝu!
Malsana kor', pro tic ĉi
doloro ne rompiĝu!

*Traduko de la Germana poemo "Wasserfahrt" de* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04) en 1984.*

*MR-167-1 / Arg-208-1367 (2012-11-26 07:56:15)*

Heinrich Heine,

# Malseka veturo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Nombradis ĉiujn ondojn mi,
ĉe l' mast' min apogante.
Adiaŭ, kara vi patruj',
Veturas mi mallante.

Mi pretervenis ĉe la dom'
De mia karulino;
Sed rigardadas vane mi,
Ne mane svingas ino.

Vi larmoj, ho, retenu vin,
Ke mi ne eĉ blindiĝu,
Ke ne pro la tro granda ve'
La kor' en mi rompiĝu.

*Traduko de la Germana poemo "Wasserfahrt" de* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2004-03-13.*

*MR-114-1 / Arg-208-416 (2004-03-13 22:52:00)*

*La poemo troviĝas en la poemkolekto „Libro de la kantoj“, sekcio „Junaĝaj suferoj – romancoj“, n-ro XIV.*

[2] aŭ:
"Adiaŭ, kara vi patri'!